


STARTO

N-ro 2/2021 (279)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Esperanto kuras por “Paraple”

karitata aranĝo pro helpi handikapitojn kun difektita mjelo

26 majo 2021

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencioj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

UK EN BELFASTO NULIGITA: ANSTATAŬE OKAZOS DUAFOJE LA VIRTUALA KONGRESO

Konsiderante la plej lastatempajn evoluojn kaj prognozojn, la Estraro de UEA decidis kun bedaŭro nuligi la ĉeestan 106-an Universalan Kongreson (UK) en Belfasto. Anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) dum la tagoj antaŭviditaj por la UK, nome de la 17-a ĝis la 24-a de julio, kaj sub la sama temo: “Paco kaj konfido: universalaj valoroj” (uea.org/gk/920).



La decidon motivigis la daŭraj problemoj pri la pandemio, kies evoluo estas pli negativa ol atendite. Aldoniĝas la necertecoj pri la tiamaj vojaĝkondiĉoj kaj pri la postulotaj pagendaj testoj aŭ kvaranteno kaj la nesufiĉa progreso de la vakcinado en Eŭropo kaj internacie. Sed ankaŭ kondukis al tio, ke la nord-irlandaj instancoj, pro la pandemio, bezonis okupi la planitan kongresejon. Dum nedifinita periodo la kongresejo estos uzata por vakcini homojn en Belfasto, sen la eblo uzi ĝin por aliaj celoj. La tuta situacio riskas malebligi la partoprenon en la UK por homoj el multaj landoj. Cetere oni deziras protekti la sanon de la partoprenantoj kaj ne endanĝerigi niajn gastigantojn. Tiuj motivoj postulis la nuligon.

Kiel indikite, ĉiuj aliĝkotoj por Belfasto estos repagitaj minus 15 EUR pro administraj kostoj; alternative aliĝintoj povos plene konservi sian aliĝkoton por unu el la du venontaj UK-oj. Ĉiuj kongresaj mendoj (kiel hoteloj kaj ekskursoj) faritaj pere de UEA aŭtomate nuliĝos; la pagitaj sumoj restos en la UEA-konto de la koncernaj kongresanoj je ilia dispono. Ĉiu aliĝinto estos rekte informita de la Kongresa Fako de UEA. Pro tio, ke la nuligo povus forte negative influi la financojn de la Asocio, aliĝintoj ankaŭ povas konsideri rezigni pri siaj aliĝkotoj kiel donaco al UEA, informante al la Kongresa Fako.

Kvankam oni devis alveni al tiu decido, la Estraro de UEA esperas, ke la 2-a VK iugrade kompensas la nuligon de la 106-a UK. La Estraro agnoskas la laboron de la Loka Kongresa Komitato, nome Tim Owen (prezidanto), Lorna Flanagan (sekretario), Michele Gazzola (rektoro de Internacia Kongresa Universitato), Gordon Flanagan, Frank Dobbs, James McMurray kaj Movado Junulara Skota (junulara programo). Kiel en 2020 la Virtuala Kongreso klopodos honori la laboron de la ĉi-jara LKK per multaj programoj rilataj al la 106-a UK. La formularo por aliĝi al la VK baldaŭ disponeblas; aliĝo estos senpaga por individuaj membroj de UEA, kiuj frue aliĝos. Ĉiuj bonvenas aliĝi al UEA per la reta aliĝilo: uea.org/alighoj/alighilo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 947

2021-04-26

2-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO: JAM EBLAS ALIĜI, SENPAGE POR INDIVIDUAJ MEMBROJ DE UEA ĜIS LA 4-A DE JULIO

Malfermiĝis hodiaŭ, la 4-an de majo, la aliĝilo al la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): vk.esperanto.net. La 2-a VK okazos dum la tagoj antaŭviditaj por la nuligita 106-a Universala Kongreso, nome de la 17-a ĝis la 24-a de julio. Ĝi havas la saman kongresan temon: “Paco kaj konfido: universalaj valoroj” (uea.org/gk/920).

Provizora programo baldaŭ aperos. La aliĝo al la VK estas senpaga por Individuaj Membroj (IM) de UEA (kaj TEJO), kiuj aliĝas ĝis la 4-a de julio 2021. Frua aliĝo gravas, por ke la organizantoj povu proponi la plej bonajn rimedojn kaj servojn. Post tiu dato, estas antaŭvidata simbola kotizo pro kostoj de traktado de malfruaj aliĝoj.

Por aliĝi al la VK IM-oj de UEA devos unue indiki sian UEA-kodon. Se la sistemo ne rekonas la kodon, vi povas kontroli ĝin ĉe uea.org/via/persono. Se vi aliĝis lastatempe, povas esti ke la sistemo de VK ankoraŭ ne havas la plej ĝisdatan informon de la datumbazo de UEA pri via membreco en 2021. Tiuokaze, bv. sciigi tion al la indikota retadreso dum la aliĝprocezo.

Se vi ankoraŭ ne membras en UEA por 2021, eblas - plej simple - samtempe aliĝi al UEA kaj la VK per la VK-aliĝilo. Tio ebligas al la sistemo tujan sciigon pri via individua membreco en UEA.

Aliĝi al la VK sen membriĝi en UEA ankaŭ eblas, kontraŭ aliĝkotizo de 50 EUR ĝis la 4-a de julio kaj 75 EUR post tiu dato.

Subtenaj donacoj por realigo de la VK bonvenas. Ĝi estas ampleksa projekto, kiu implicas diversspecajn kostojn, kaj ĉiuj donacoj gravas. Ĉiuj, kiuj donacos ekde 50 EUR, fariĝos oficialaj “Subtenantoj de la Virtuala Kongreso”. Eblas facile donaci per la kreditkarta formularo ĉe la VK-aliĝilo - aŭ per via UEA-konto al la fonduso por la Virtuala Kongreso (uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso) kun sciigo al la Financa Fakoj (financoj@co.uea.org). La nomoj de la donacintoj aperos (laŭkonsente) en danklisto ĉe la listo de aliĝintoj (senpere, se la donaco okazas per la VK-aliĝilo, aŭ post konfirmo de la Financa Fakoj, se ĝi okazas pere de UEA-konto). UEA antaŭdankas ! ĉiujn su btenantojn.

Simile al la pasintjara VK (mondafest.net/programo/), la 2-a VK havos riĉan kaj vigran programon dum ok tagoj. Ĝi prezentos ne nur popularajn programerojn de la tradicia Universala Kongreso, kiel Internacia Kongresa Universitato (IKU), Scienca Kafejo, Tago de Lernado, Aŭtoraj Momentoj, Libro de la Jaro, Akademio de Esperanto kaj Aŭkcio, sed ankaŭ multajn aliajn novajn programerojn. La programo antaŭvidas plurajn artajn kaj kulturajn momentojn, virtualajn ekskursojn kaj sukcesajn programerojn de la pasintjara VK, kiel la virtualajn ekskursojn kaj la specialan programeron pri kuirarto tutmonde.

Ne maltrafu la 2-an Virtualan Kongreson! Aliĝu plej frue:

vk.esperanto.net.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 949
2021-05-04

Ĉu vi konas niajn manifestojn?

Deklaracio de Tireso 1969

Plivastigi la dimension de la individuo

En pluraj prelegoj kaj diskutgrupoj kun la ĝenerala temo "Junularo kaj socio" ni pristudis la nuntempan radikalan ŝanĝon de la rolo de la junularo en socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.

La mobilizo okazas ĉefe pro sento, ke la libera evoluo de la individuo estas pli kaj pli endanĝerigata de la establitaj ordosistemoj.

La establitajn ordosistemojn subtenas du tendencoj: unue, malaktualaj kaj tro normigaj konceptoj pri la homo, due, la rapide evoluanta teknologio, kiu emas detruoj kaj anonimigi la individuecon, detruoj la fizikan ĉirkaŭaĵon de la homo, kaj subfosi la homan psikon.

La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn agadoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj agadoj.

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemoj, kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke oni ne sufiĉe atentis la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. Tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo.

En nia propra laboro ni antaŭvidas esploradojn kaj informadon pri la neadekvato de la monda lingva situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia programoj.

La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo.

La estonta agado de TEJO inkluzivos lanĉon de agadoj, kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de TEJO, kiel organizaĵo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado.

Ni alvokas ĉiujn homojn kaj junularajn organizaĵojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de TEJO.

Manifesto de Raŭmo 1980

1. Krizo de identeco

La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la esperantistaro, kvazaŭ konflikton inter idea superego kaj ego: nia superego igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj – la dua lingvo por ĉiu / la angla lingvo estas nia mal-amiko / UNO devas adopti Esperanton, ktp. – kaj laŭdegi la lingvon eĉ neobjektive okaze de intervjuo; samtempe, inter ni, ni ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio kio ĝi efektive estas, sendepende de la praelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera.

2. Kritiko de praeloj

Ni kredas ke:

a) la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca dum la 80aj jaroj – oni havu alternativajn celojn;

b) la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel *helplingvo*,

analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

3. Niaj celoj

Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvoinstruado;
- b) kontaktoj inter ordinaraj homoj;
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj;
- ĉ) novtipa internacia kulturo.

Lige kun la lasta valoro, ni emfazas ke la serĉado de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon kvazaŭ la aparteno al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciiĝo pri tiuj ĉi valoroj.

4. La kongresoj kiel vojo al kresko

Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervi la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj, laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas fortigi la uzon de E-o kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, laŭ la modelo de la Freinet-instruistoj.

5. Ni kredas ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi *ĉion*; meze de la 80aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri *ion* - ion kulture originalan kaj internacie valoran.

Proklamo de Voss 1991

Esperanto kiel funkcia lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcia lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu neniun specifan lingvon – naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen mal-

kontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto – ĝia destino

La tradicia termino "fina venko" kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikan. La plukreo de aŭtonoma Esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj finvenkemaj esperantistoj estas transpontebla – ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori. Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de Esperanto ne okazos:

- sole per la klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek la rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;
- sen la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastiĝantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭa "fina venko" povas naski frustrajn, certe iel forigendajn, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion farinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj kiuj malfermus la vojon al tio.

Manifesto de Prago 1996

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, *direktas* ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo, *deklaras* nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj *invitas* ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Principoj, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio. Komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas, ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano, kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano, kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas, ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco. Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas, ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco. La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj, kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plur-lingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas, ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas, ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas, ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas, ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

Libroj por japana muzeo



En la monata gazeto *Novaĵoj Tamtamas*, kiun mi ricevas danke al miaj amikoj el Japanio, mi sciiĝis, ke en Jokohama oni sukcesis akiri domon por Esperanto-Muzeo. Inter la unuaj gratulantoj estis honora membro de nia klubo Petr Chrdle, kiu krom gratulo donacis librojn el sia eldonejo. Tial ankaŭ ceteraj membroj de la Esperanto-klubo en Svitavy decidis riĉigi la kolekton de la nova muzeo. De la ĉeĥa Esperanto-Asocio ni aĉetis librojn plejparte de ĉeĥaj aŭtoroj, ekz. de Karel Čapek, Jaroslav Vrchlický, K. H. Mácha, Jaroslav Foglar, Jaroslav Seifert, Josef Vondroušek aŭ Stanislav Schulhoff. Ni klopodas danke al Esperanto riĉigi la japanan bibliotekon per ĉeĥaj verkistoj. Plej multe min ĝojigis, kiam redaktoro de la monata gazeto sendis al mi ligan al lia nova retejo, kie mi sur bildo vidis ĉeĥan lernolibron „Učíme se písmena“ (Ni lernas literojn). Mi jam antaŭe ĝojas pri kunlaboro.

<https://1url.cz/xKoLR>

Libuše Dvořáková

P.S. Petr Chrdle sendis al la muzeo 18 valorajn publikaĵojn, inkluzive de *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk* kaj *For la batalilojn!*. Malgraŭ tio, ke li klare skribis, ke temas pri donaco kaj li ne atendas reciprokon, li ricevis plurajn japanajn eldonaĵojn en Esperanto, kiujn li jam havas preparitaj kun aliaj aĵoj por donaci ilin al la Esperanto-Muzeo en Svitavy.

Internacia Esperanto-Arkivo

mallonge IEA, estis fondita la 22-an de januaro 2021.

La tri administrantoj estas Bert Boon (Tienen), Roland Rotsaert (Brugge) kaj Marc Vanden Bempt (Winksele).

La Arkivo celas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, en ilia originala formo. Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

Provizore la **Arkivo povas resti** en la nuna loko en la centro de Belgio (tuj apud Leuven), sed ĝi serĉas novan ejon konstruitan aŭ konstruotan laŭ la specifaj postuloj por arkiva konservado por eterne.

Ĉiu persono (esperantisto aŭ ne) estas petata subteni kiel *amiko*; *mecenato*; *aĉetanto* (de brokantaĵoj kaj “Briktoj”); eventuale kuninvestanto kaj volontulo (ekzemple, por ordigi kaj plivastigi la kolekton). Detalojn vi trovas en la retejo, ĉe *arkivo.eu*.

La fondaĵo originas el la persona kolekto de Cesar Vanbiervliet (1905–1992), urba oficisto de Kortrijk (Belgio), kaj la kolekto de Marc Vanden Bempt (kunigita kolekto “Vanden Bempt – Vanbiervliet”). En decembro 2018 la biblioteko CDELI en la Chaux-de-Fonds transdonis siajn duoblaĵojn. Fine de 2020 tiel estis 13 175 libroj, 7 520 plenaj revujaroj (de 960 titoloj) kaj 4 907 ne-plenaj revujaroj (de aldonaj 407 titoloj). En 2019 estis lanĉita propono transpreni la bibliotekon kaj fondaĵon Hodler de UEA.

De via subteno dependas la realigado de la celo!

Laŭ la revuo Esperanto, 5/2021, p. 105

LA 9-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2021

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.



Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi vian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – **ĝis la 15-a de aŭgusto** –

<https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu>.

Tiel okazos konkursa provaŭdo de partoprenantoj. Antaŭ ĉio bonvolu sendi plenigitan aliĝilon.

Ĉi-jare la publiko aljuĝos sian premion, la Publik-premion, nur al video-kantoj. La voĉdonado okazos rete **ekde la 15-a de aŭgusto**.

La Festivalo okazos en tri kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto. 3. registrita en studio.

La 12-an de septembro – okazos Koncerto de la Premiitoj rete.

Honoran patronecon pri la festivalo jam akceptis Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo (de urbo Vroclavo) kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Eurokka (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), Juna Amiko (la plej konata kaj ŝatata revuo de

Esperantujo) kaj Varsovia Vento (interreta radio).

La organizanto estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).

ATENDAS VIN MULTAJ BELEGAJ PREMIOJ! –

Unu el la premioj **fondis EUROKKA** - estas 3 premioj - jarabonoj al ABONKLUBO (aliro al la kompleta katalogo de Vinikosmo, al katalogoj de 75000 aliaj sendependaj eldonejoj kun 400 000 artistoj kaj 7 milionoj da titoloj) Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640, www.ecem.com.pl/

<https://www.facebook.com/efekantoj/>



La organiza teamo de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj



Eventa servo

Ni esperantistoj ŝatas, kiam ni povas renkonti aliajn esperantistojn. Por ke ni povu ilin renkonti, ni bezonas scii, kie kaj kiam okazos vizitindaj Esperanto-aranĝoj. Estas malfacile serĉi informojn pri unuopaj aranĝoj en diversaj retejoj. Estus pli bone, se ĉiuj esperantaj eventoj estus en unu loko. Kaj grandaj internaciaj, kaj malgrandaj lokaj. Kaj ĉeestaj, kaj retaj. Kaj unutagaj, kaj plurtagaj. Jam ekzistis kaj ekzistaj kelkaj projektoj. Grandaj internaciaj eventoj estis troveblaj ĉe *eventoj.hu*. Elektitaj ĉeĥaj Esperanto-aranĝoj estas anoncataj ĉe *Esperanto.cz*.

La retejo *eventoj.hu* estis kalendaro de internaciaj Esperanto-aranĝoj ekde 1996 ĝis 2020. Ĝi estis prizorgata de Szilvási László, Ország-Krysz Axcel, Mészáros István kaj Keményfi Imre kadre de Lingvo-Studio en Budapeŝto. Ĝi certe estis grava projekto por nia movado. Sed la interreto kreskis kaj la retejo restis sama. Ĝi estas malbone uzebla en nuntempaj poŝtelefonoj. Ĝi bezonis redaktoron, kiu metis aranĝojn en liston. Se iu volis aldoni aŭ ŝanĝi informon pri la evento, li devis demandi redaktoron. Ĝi listis nur internaciajn aranĝojn.

Esperanto.cz estas ankaŭ prizorgata de redaktoroj.

Ekde jaro 2017 ekzistas nova retejo eventaservo.org. Ĝin programis Fernando Ŝajani. En la jaro 2019 li donis la sistemon al UEA kaj TEJO. Grandaj helpantoj estas Yves Nevelsteen kaj Robin van der Vliet.

Eventa Servo funkcias alie ol ĝia antaŭulo eventoj.hu. Ĝi ne bezonas redaktorojn, kiuj enmetadas aranĝojn en la kalendaron. Ĉiu klubo aŭ organizo povas krei konton de uzanto kaj administri siajn eventojn mem. Tial en Eventa Servo povas esti ne nur grandaj internaciaj aranĝoj, sed ankaŭ lokaj kunvenoj.

Tio estas grava en nuna tempo de pandemio. Vi facile povas trovi retan esperantan renkontiĝon en fora lando kaj konekti al ĝi. Estas homoj, kiuj vizitadas multajn retajn renkontiĝojn ĉiusemajne. Por ili aperis nova esperanta vorto – retkolibroj.

Ekde ĉi-jaro eventoj.hu ne estas plu prizorgataj. Ĝi restas nur arkivo de pasintaj aranĝoj.

Nia klubo en Brno uzas Eventan Servon jam ekde 2019. Unuajn niajn aranĝojn tien metis Yves Nevelsteen. Poste mi registris kaj ricevis rajton administri niajn aranĝojn. Ekde oktobro 2020 niaj renkontiĝoj okazas nur rete per Skajpo. Kaj danke al Eventa Servo niajn retkunvenojn vizitadas ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.

Eventa Servo havas eĉ alian avantaĝon. La eventoj estas enporteblaj en aliajn sistemojn. Mi mem tion ne provis, sed la kreintoj tion asertas. Tio estas tre grave. Oni povas meti afiŝon pri aranĝo en Eventan Servon kaj de tie aŭtomate liveri en alian retpaĝaron.

Ĉeĥaj aranĝoj en Eventa Servo mankas. Ĝi enhavas nur aranĝojn de Esperantista klubo Brno. En reta paĝaro www.esperanto.cz kelkfoje aperis aranĝoj de Praga Esperanto-klubo kaj E-mental. Ĉu nur Brno kaj Praha nun agas?


Ni estas malmultaj kaj ni devas esti videblaj. Ni afiŝu ĉiujn, eĉ lokajn Esperanto-aranĝojn en Eventa Servo. Kompreneble ne povas manki tutlandaj aranĝoj kiel asocia kongreso, lernejo en Bartošovice, aranĝoj en Svitavy ktp. Se ĉiuj ĉeĥaj aranĝoj estos en Eventa Servo, la retpaĝaro esperanto.cz povus ilin aŭtomate enportadi. Tio ŝparos tempon kaj de la redaktoroj de Esperanto.cz, kaj la vian. Vi ne bezonos skribi retmesaĝojn al redaktoroj kaj atendi aŭ krei la afiŝon kelkfoje.

Ni uzu Eventan Servon.

Milan Kolka

Kodaj nomoj

Se ni volas bone regi iun ajn lingvon, ni bezonas uzi ĝin. Vi bezonas paroli en la lingvo kaj pensi en ĝi. Por tio estas bonaj ankaŭ vortludoj. Ni en Brno kelkfoje ludis kelkajn ludojn. Unu ni eĉ eldonis – ĝi nomiĝas Abecedino kaj ĝi estas havebla en nia retbutiko.



Sed mi volas skribi pri alia ludo. Ĝi nomiĝas Kodaj Nomoj (ĉeĥe Krycí jména). Aŭtoro de la ludo estas Vladimír Chvátil (lia kromnomo estas Vlaada Chvátill) el Brno. La ludo estas monde populara kaj estis jam eldonita en pli ol tridek lingvoj.

Kio estas principo de la ludo? Por ludi oni bezonas almenaŭ kvar ludantojn. Ili reprezentas du grupojn da spionoj. La ruĝuloj kaj la bluuloj. Ĉiu teamo havas unu ĉefspionon kaj almenaŭ unu terenajn spionon. Sur la tablo kuŝas 25 kartoj kun vortoj. Tiuj vortoj estas kaŝnomoj. Ili povas aparteni al unu el la du teamoj. Kelkaj vortoj reprezentas ordinarajn homojn – ili nomiĝas preterirantoj. Unu karto estas kaŝnomo de murdisto.

Nur ĉefspionoj scias, kiu rolo apartenas al ĉiu karto. La tasko de ĉefspionoj estas suflori al terenaj spionoj, kiuj vortoj estas kaŝnomoj de agentoj de ilia teamo. La aludo estas nur unu vorto, kiu havas ion komunan kun senco de unu aŭ pli kaŝnomoj. La tasko de terenaj spionoj estas indiki laŭ la aludo siajn agentojn.

La ĉefspionoj alternas. Venkas teamo, kies ĉiuj agentoj estas trovitaj. La teamo ankaŭ povas venki, kiam la kontraŭulo erare indikos ne sian, sed kontraŭulan karton. La ĉefspiono devas zorge pripensi la aludon. Se la terenaj spionoj laŭ malbona aludo indikos karton kun vorto, kiu reprezentas la murdiston, tiu teamo malvenkas.

Kompreneble tiu ĉi ludo ne estis eldonita en Esperanto. Ni tradukis la kartojn por ni mem en Esperanton kaj kelkfoje ludis ĝin en la klubejo.

Bedaŭrinde pro la pandemio ni ne povas renkontiĝadi en la klubejo. Ni nun renkontiĝas nur rete per Skajpo. Ni trovis, ke ĉeĥa firmao Czech Games Edition, kiu eldonis la ludon, lanĉis retpaĝaron, kie oni povas ludi rete. Do ni demandis, ĉu ni rajtas traduki la ludon en Esperanton. La firmao konsentis. Ni tradukis kartojn kun vortoj kaj uzatan fasadon de la retejo. Tial oni povas ludi Kodajn nomojn rete en Esperanto. Nun ni ankaŭ tradukas regulojn en Esperanton. Ni ludis la ludon rete en marto kaj ni esperas, ke ni ludos denove.

La ludon vi povas ludi rete ĉe <https://codenames.game/>. Regulojn en diversaj lingvoj vi povas legi ĉe <https://czechgames.com/en/codenames/downloads/>. Ni esperas, ke baldaŭ tie aperos ankaŭ reguloj en Esperanto.

La plej malfacila tasko plu restas. Estas konate, ke estas malfacile traduki, kiam temas pri lingvo-ludoj. Vortlisto, kiun ni kreis, estas traduko de ĉeĥa vortlisto. Sed ĉiu lingvo havas siajn vortliston tre zorge elektitan. Ĉar estas bezonataj vortoj, kie eblas trovi ion komunan.

Sed se estas io, kio estas komuna por multaj vortoj, la ludo estas pli malfacila. Mi provis ludi ĉe ĉe ludon kun speciala vortlisto, kie ĉiuj vortoj rilatas al kristnasko. La ludo estis pli malfacila ol kutime. La vortlistoj enhavas ofte plursignifajn vortojn. Ekzemple ĉe ĉe vorto *zámek* (kastelo, seruro) povas rilati kaj al vorto *dveře* (pordo) kaj al vorto *hrad* (kastelo, burgo). Esperanto estis konstruita tiel, ke ĝi ne havu plur-signifajn vortojn.

Alia problemo estas, ke eksterlandanoj ne scias kelkajn aferojn, kiuj estas ĉe ĉe ĉe. Ekzemple en la ĉe ĉe vortlisto estas vorto *Brno*. Laŭ vortaro la traduko en Esperanto estas *Brunno*. Sed tio estas ne-PIVa vorto kaj neniu ĝin konas. Eksterlandanoj pensis, ke tio estas erare skribita *bruno*. Tial ni tiun vorton anstataŭigis per *Bjalistoko*, kiu estas inter esperantistoj pli konata.

Ni volas krei novan liston de esperantaj vortoj. Sed tio ne povas esti nur hazardaj vortoj. Ili devus esti zorge elektitaj, por ke la ludo estus ludebla. Se vi estas sperta ludanto de Kodaj nomoj kaj sperta esperantisto, vi povus helpi nin.

Ĉiukaze provu Kodajn nomojn rete en Esperanto ĉe [https://codenames.game/!](https://codenames.game/)

Ĝuu la ludon!

Milan Kolka
Esperantista klubo Brno

120 jaroj de EK Brno



La plej malnova nia klubo, fondita en 1901 en Brno kun oficiala aprobo, festos sian 120-an datrevenon la 18-an de septembro 2021 en Nosreti, Křenová 409/52 ekde la 10 h.

Datrevenoj de niaj UK-oj

■ La unua UK-o en Prago okazis en 1921 sur la insulo Žofín.



Partoprenis 2561 kongresanoj, estis tie fondita SAT kaj okazis unua blindula kongreso. En la teatro de Vinohrady oni ludis komedion Nokto en Karlův Týn de Jaroslav Vrchlický, tradukis Miloš Lukáš.

■ La duan UK-on ni sukcesis okazigi nur en 1996, ankaŭ en Prago, sed en la kongresa centro. Partoprenis 2972 kongresanoj. La kongreso akceptis la t.n. Manifeston de Prago. Aperis 11 numeroj de kongresa kuriero Pragaj Sonoriloj, realiĝis Internacia Kongresa Universitato, prelegis ankaŭ Nobel-premiito Reinhard Selten. Estis prezentita Aŭdienco de Václav Havel.



ILEI anoncas :

Pri la 54-a ILEI-Kongreso en 2021

2021-06-03

Ni devas rezigni pri la surloka fizika kunveno en Benino. La anoncoj pri aliĝoj estis tre malmultaj pro la daŭraj limigoj kaj obstakloj en vojaĝado. Tamen la pandemia situacio en Benino daŭre estas tute kontentiga kaj sekura.

ILEI lanĉas virtualan Kongreson, temas pri

54-a - ILEI Kongreso VEKI 2

7 – 14 aŭgusto 2021

Okaze de tiu evento Benino restos en nia fokuso, ĉefe en la Nacia Vespero.

La kongresa temo estas kaj restas: **“Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”**

La komitatkunsidoj okazos dimanĉe 8-an kaj marde 10-an de aŭgusto.

Dutaga simpozio okazos ĵaŭde 12-an kaj vendrede 13-an de aŭgusto.

La temposkemo en tri sesioj en ĉiu tago restos la sama kiel en 2020 en VEKI 1.

La teknika organizado estas en la manoj de Unika.

La programa starigo estas en la manoj de Marija Belosevic kaj Mireille Grosjean.

La simpozia koncepto estas en la manoj de Ivan Colling kaj Radojica Petrović.

La aliĝilo estas en preparo.

La Kongreskotizoj estos :

por A-landanoj 20 EUR. Por B-landanoj 10 EUR. Por subvenciataj personoj (ni alvokas al A- kaj B-landanoj, ke ili

subvenciu unu aŭ plurajn personojn, kiuj ne povas facile transpigi ian sumon al Eŭropo.) 5 EUR. La pagoj povos okazi per ĝirado el UEA-konto de parto-prenonto al UEA-konto de ILEI aŭ per ĝirado per kreditkarto al indikota banko en Belgio.

Por demandoj kaj proponoj pri pagado kaj subvencio turnu vin al Mireille Grosjean : mirejo.mireille@gmail.com.

Por proponoj pri la programo turnu vin al Marija Belošević miriam010@gmail.com kaj Mireille Grosjean mirejo.mireille@gmail.com.

Por demandoj pri la simpozio turnu vin al Ivan Colling iecolling@yahoo.com.br kaj Petrović Radojica radojica.petrovic.rs@gmail.com

Por demandoj pri la teknika aspekto de VEKI2 turnu vin al Unika unika@esperantujo.io

Ni forte esperas, ke tiu 54-a Kongreso estos fruktodona, lertiga, interesa kaj distra.

Nome de la Estraro:

Mireille Grosjean, prezidanto.



Muzea Nokto en Svitavy

Vendrede la 4-an de junio 2021 okazis en la Urba Muzeo en Svitavy renovigita renkontiĝo de histori-amantoj enkadre de tutrespublika aranĝo Nokto de Muzeoj.



Esperanto-muzeo proponis al la vizitantoj eblon rigardi la ekspozicion pri la historio de Esperanto-movado en Ĉeĥa Respubliko. Plue estis preparita konkurso pri valoraj premioj, bazita sur fundamentoj de Esperanto.



Sinjorino Minářová rakontis al interesatoj pri la historio kaj konatigis ilin kun la fundamentoj de la internacia lingvo. Unu el junaj vizitantinoj laŭ siaj scioj el lingvolernejo provis

diveni signifon de unuopaj vortoj kaj eĉ traduki simplan esperantlingvan tekston.



Fine de la konkurso la infanoj venis al tilio, kiun la E-klubo Svitavy plantis omaĝe al 50-jariĝo de refondiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.



Ĉiuj vizitantoj ricevis publikaĵojn pri Esperanto, ĉeĥan-esperantan vortaron kaj nove eldonitan turisman markon de Esperanto-muzeo en Svitavy.

*Jan Richtr
teksto kaj fotoj*

AŬTUNA LINGVA ESPERANTO-SEMINARIO, la lasta aranĝo de nia Lenka

Aŭtune 2020 daŭris nelonga somera-aŭtuna paŭzo inter du ondoj de koronavirusa pandemio. Tiam la homoj povis ankoraŭ kunvenadi en pli grandaj grupoj, aĉetadi en vendejoj, viziti teatrojn kaj ĝui aliajn aferojn de normala vivo.

Pensiono „Espero“ de D-ro Hradil en Skokovy en Ĉeĥa paradizo, kie Jindřiška Drahotová organizis la ĉiujarajn E-seminariojn, ne plu estis malfermita, nun ĝi estas fakte malkonstruita.

La organizon de la seminarioj do transprenis Lenka. Ŝi serĉis taŭgan lokon por organizi tiun ĉi aranĝon. Ne estas facile trovi sub unu tegmento domon sufiĉe komfortan kun konvena loĝado, manĝejo, societa salono, klubejo.

Lenka traveturis kelkajn pensionojn kaj feliĉe trovis eble la plej belan: pensionon Kavka (Monedo) en Malá Skála, urbeto en Ĉeĥa paradizo.

La pitoreska urbeto estas atingebla per vagonaro kaj de sufiĉe malproksima stacidomo Lenka veturigis la malpli moveblajn partoprenantojn per sia aŭtomobilo al la pensiono.

La bela kaj agrabla pensiono Kavka situas iom flanke de la urbeto, kiu estis pulsanta de vivo kaj ĝojo – estis multaj, ĉefe junaj homoj tie – sur stratoj, en vendejoj, kafejoj, gastejoj.

La agrabla pensiono Kavka estis kvietaj kaj amikeca.

La septembran E-seminaron partoprenis pli ol 20 homoj. Komence estis pli multe da aliĝintoj, sed kelkaj malabonis sin timante la pandemion. Sed tiuj, kiuj restis, ĝuis vere agrablan varmveteran semajnfino.

La loĝoĉambroj situis en unua etaĝo,

en teretaĝo estis manĝejo, granda societa salono kaj klubejo. Niaj 3 kursoj – por komencantoj (gvidis Jindřiška), por progresintoj (gvidis Magda Fejfičová el Slovakio) kaj konversacia grupo (gvidis Margit Turková) havis sufiĉe da spaco por praktiki la lecionojn.

Ĉiumatene, kvankam la ekstera temperaturo ne estis tro alta, okazis matena gimnastiko ĉe baseno sub gvido de Jindřiška. Oni povis ankaŭ piednude promeni sur freŝa, rosoplena herbejo.

Post matenmanĝo okazis instruado en la tri kursoj kaj post bongusta tagmanĝo ekestis libera tempo. Kelkaj partoprenantoj ĝuis la sunplenan, varman veteron kaj faris ekskurson al belega ĉirkaŭaĵo – al ruino de burgo Frýdštejn aŭ al preĝejo kaj ruino de burgo Vranov, ambaŭ videblaj de la pensiono.

Vesperojn plenumis amuza komuna programo en klubejo.

La ĉeestantoj disveturis post dimanĉa tagmanĝo, dankante al afabla personaro kaj ĉefe al la sukcesa organizado de Lenka. – Lenka, ĉu vi aŭdas la laŭdon? Koran dankon de ĉiuj kontentaj partoprenantoj! LChal



ĈEA-konferenco en Bartošovice

Inter la 1-a kaj 3-a de oktobro 2021 okazos (ni esperas) la asocia konferenco en la kastelo Bartošovice, kie jam realiĝis pluraj Esperanto-kursoj.



La vilaĝo situas en la distrikto Nový Jičín, proksime de Studénka, kie troviĝas la plej proksima fervojstacio, de kiu forveturas ĉiam post 20 minutoj aŭtobuso al Bartošovice. Alia fervojstacio estas en Suchdol, kie eble loĝos parto de konferencanoj. La organizantoj povas transporti interesatojn per siaj aŭtoj (tel. 608 124 823 Pavol Kaščák).



Krom la kastelo estas vidindaj ankaŭ preĝejo de Sanktaj Andreo, Petro kaj Paŭlo, Kripto de nobela familio Meinertidoj kaj fiŝlagoj en la bela ĉirkaŭaĵo, kiuj proponas agrablan promenon.



La kastelo mem estas baroka, sed en la 19-a jarcento alikonstruita en novrenesanca stilo. En teretaĝo troviĝas manĝejo, vizitata ankaŭ de infanoj el proksimaj lernejoj. En la supraj etaĝoj estas dormoĉambroj kaj ankaŭ societaj ĉambroj uzeblaj por instruado, koncertado, bankedo kaj similaj aranĝoj.

Traktadoj povas okazi ankaŭ en historiaj ĉambroj.



Provizora programo

Vendredo 1.10.2021

15-17 h: alveno de la partoprenantoj

vespere: IVAN ACHER kaj liaj gastoj,
operkantistoj el Nacia Teatro Praha



La koncerto estas monsubtenata de Verda Stacio



kaj Teamanta Esperantista Organizo



Sabato 2.10.2021

antaŭtagmeze: La membrokunveno

posttagmeze: bus-ekskurso al Kopřivnice
kaj Štramberk

vespere: kantgrupo de Zdeněk Gybas,
danc-amuza vespero kun tombolo

Dimanĉo 3.10.2021:

antaŭtagmeze: daŭrigo de membrokunveno, diskuto, rezolucio

La aliĝilo estos en la asocia retejo.

POZVÁNKA NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s. (ČES),

která se koná v dobovém sále zámku v
Bartošovicích

dne 2.10.2021 od 9 hodin

PROGRAM: Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatele zápisu)

Zpráva o hospodaření ČES

Zpráva o činnosti ČES a jejích organizačních složek

Diskuze ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES

Různé

Usnesení

Závěr

V Bohutíně 5.6.2021

Mgr. Libuše Hýblová,
předsedkyně ČES, z.s.



ESPERANTISTOJ KURIS POR PARAPLE



Paraple (la vorto mem signifas en la ĉeĥa ankaŭ "ombrello") estas nomo de la ĉeĥa organizo fondita en 1994, zorganta pri personoj suferantaj pro paraplegio - senmovigo de kruroj pro (kutime akcidenta) difekto de mjelo (ĉeĥe = mícha). Pri la malsano kaj pri konkretaj admirindaj aktivecoj de la organizo traktos speciala artikolo en somerferia numero de la *AEH-Infomilo*. Centrum Paraple faras multon utilan por psika kaj fizika revigligo de rulseĝuloj pere de specialaj terapiaj restadoj, kies kostojn la sanasekurejo tamen kovras nur parte. Por subteno de ĝia agado en 2000 estiĝis la karitata societa aranĝo *Kuro por Paraple*. Ĝi okazis ĉiujare en junio kaj la ĉefaj sportdisciplinoj estis kuro de duopoj de plenkreskuloj kaj infanoj je 100 m, por sportemuloj eblis ankaŭ distanco 5 km. La kolektitaj partoprenkotizoj kaj donacoj servis precipe por realigo de la terapiaj restadoj.

Ĉar pro COVID-19 en 2020 la aranĝo ne povis okazi kaj ĉi-jare minacis la samo, oni decidis realigi la aranĝon en virtuala formo. Inter la 1-a kaj la 29-a majo povis partopreni ĝin ĉiuj interesitoj sendepende de la loĝloko. Post pago de minimuma startkotizo 199,- CZ ĉiu povis mem elekti sian disciplinon - ĉi-jare ne nur kuron, sed ankaŭ piediradon, kuradon kun hundo aŭ bicikladon - kaj mem anonci sian privatan atingindan celon (en km). Oni povis konkursi individue aŭ en grupoj, plej multe kompreneble gravis ne venki, sed partopreni kaj fari ion "por bona afero".

29.5. okazis en Prago-Malešice solena proklamo de rezultoj, kune kun akompana programo. **Entute registriĝis** kaj minimuman startkotizon pagis **4181 personoj**, ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Slovakio, Hispanio, Belgio kaj Japanio. **Sume oni kolektis 1 780 955 CZK** (t.e. ĉ. 70 116 eŭrojn), kiuj estos uzitaj por la agado de la Centro Paraple kaj reaktivigo de ĝiaj klientoj.

La neformala Esperanta klubo E-mental', kies multaj membroj samtempe membras ankaŭ en ĈEA, partoprenas grupe en *Kuro por Paraple* jam ekde 2016. Dank' al oferema iniciatemo de Vlasta Pištíková oni kuniĝis ankaŭ ĉi-jare. **Entute al la grupo ESPERANTO aliĝis 30 geesperantistoj (kaj 4 familianoj)**, ne nur membroj de la klubo (i.a. ankaŭ ĈEA-estraraninoj L. Hýblová kaj A. Švubová, J. Vojáček, M. Bloudek, S. Nováková, M. Zemanová, M. Fejfičová k.a.). **El inter 706 grupoj ĝi estis sur bela la 33-a loko**, oficiale kun poŝtelefono registritaj **1756 kilometroj** (sed reale multe pli, ĉar granda parto de homoj ne uzis kalkuladon). Plej viglis J. Mišurec. Sume esperantistoj kontribuis por la Centro Paraple per supozeble **pli ol 7500,- CZK**. La 29-an de majo parto de la grupanoj renkontiĝis kaj festis dum la aranĝo nomita VENKO (Verŝajne Ege Nekredebla KunvenO). Koran dankon al ĉiuj partoprenintoj! Videblas, ke ankaŭ en la nuna malfacila tempo eblas fari ion agrablan kaj utilan por sia sano, por la aliaj kaj por diskonigo de Esperanto! Sekvontjare bonvenas ankaŭ vi!

Pavla Dvořáková

El Esperantujo

■ **Unesko unuafoje faris enketon per Esperanto** - Por vaste kolekti ideojn kaj bone prepari la tutmondan raporton, Unesko fondis Internacian Komisionon pri Futura Edukado kun 17 altrangaj fakuloj el diversaj landoj, estratan de s-ino Sahle-Work Zewde, la Prezidento de la Federacia Demokrata Respubliko Etiopio. Unesko publikigis 1-minutan enketilon en 17 lingvoj, inkluzive Esperanton danke al la iniciato kaj traduko de Renato Corsetti.

■ **Gazeto de BAES** (Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj) estas nova gazeto ekde la 1-a de majo 2021. Senpagaj elŝutoj ĉe www.febnet.org.br.



■ En la ĉeĥlingva gazeto **Moje země** (Mia lando) 2/2021 sur p. 48 aperis enketo pri Ĉeĥio en dudek demandoj. La 6-a demando postulas respondon, kiu unika muzeo troviĝas ekde 2008 en Ottendorfer-domo en Svitavy: a) Muzeo Oskar Schindler; b) Muzeo de Esperanto, c) Juda muzeo.

■ **Ruĝaj vojoj de Aŭrovido** de Paweł Kowalczyk en traduko de Ewa Grochowska estas libro preparata en la slovaka eldonejo **ESPERO**. Aŭrovido estas eksperimenta urbo en Hindio kun 3 mil loĝantoj el 58 nacioj (volontuloj el la tuta mondo). La aŭtoro estas pola volontulo, kiu priskribas siajn travivaĵojn en tiu urba eksperimento.

■ **Esperigaj Komunikoj** (EKO) estas alia aktiveco de ILEI, PDF-sciigoj pri diversaj temoj (Hector Hodler, Pandemia kurso, Nova kurso por hispanlingvajoj) k.a.

■ **Konferenco pri la estonteco de Eŭropo** estis lanĉita la 9-an de majo 2021 virtuale ĉe <https://futureu.europa.eu/> La teksto en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU diskutas pri diversaj problemoj inkluzive pri la lingva komunikado.

■ **Aktivula Maturigo** (AMO) estas seminarioj de ILEI pri diversaj temoj kaj en diversaj landoj. Aprile en Irano: *Ŝtopi la digojn* (trovi malfortajn punktojn en la movado), virtuale *Komerco favoru esperantistojn* (en majo), *Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo* (virtuale 22-an de julio 2021)

■ **KRISTANA KONGRESO** (70-a kongreso de KELI) okazos en la tagoj 7. – 14. 8. 2021 en LEGNICA (Pollando). Ĉiuj necesaj informoj: <https://keli.sea-vroc.eu>



Ni antaŭĝojas vian partoprenon.

Estraro de KELI

■ **Teo kaj amo akiris la unuan premion.** En festivalo de neprofesia filmo FILMDAT en la regiono Kroměřitz akiris la unuan premion filmo **Ĉaj a láska** de esperantistoj Rostislav Ĉubok kaj Pavol Kaščák. Informo estas trovebla ĉe la adreso:

<http://www.filmdat.cz/filmy.php?detail=7959>

Manifestoj de la Vivo

Estas malfacile priskribi la nepriskrib-eblan. Por ties celo ni uzadas la vortojn de komparado kaj alegorio. La Vorto estas tre forta ilo.

Se ni akceptas, ke la universo (en ĝi la Vivo) estas trapenetrita de nekaptebla forto simila al la penso (ideo), kies manifestojn ni kumulas en la termino „Dio“, ni devas plue ankaŭ akcepti, ke la komunikado kun la dio-forto, aŭ pere de ĝi, estas unu el la demonstroj de la Vivo.

Apud la jam konataj kategorioj de komunikado ni intuicie antaŭscias la ekziston de iu formo, kiu estas eksterniaj sensoj. Pli proksime estas eble esploristoj, kiuj okupiĝas pri la „parol-eblo de plantoj“. Ni ankaŭ jam scias, ke bestoj reagas maltrankvile al proksimiĝanta tertremo. Oni atribuas tion al ilia sentemo je la ŝanĝoj de geomagneta kampo.

Ĉu ankaŭ ni, homoj, estas kapablaj de simila perceptado, aŭ ĉu ni la kapablecon tute perdis? Ĉu ni povas kompreni la „kondukon“ de plantoj? Kiel reagas la vegetala regno al la minaco de tertremo, inundo aŭ incendio?

Estis konstatite, ke la plantoj sur la esplor-aparatoj abrupte reagas jam en la momento, kiam oni nur pripensas deŝiri aŭ bruligi eĉ parton de ties folieto. Tio estis jam reale pruvita; kaj ne nur tio... Oni scias ankaŭ pri la kapableco de plantoj komuniki inter si reciproke, eĉ kun la homo. Bedaŭrinde, ĝis nun tio estas komunikado nur unudirekta...

La plantoj reagas je ideo-instigoj. La planto, kun kiu vi „enamikiĝas“ estas kapabla (pere de plifortig-aparatoj) estingi kaj malestingi lumon en via

domo. Sufiĉas pri tio nur pensi. Neniu scias, kiel rapide kaj kiom distance transpreniĝas informo inter homo kaj planto. Precipe – pere de kio!! La kontakto funkcias ankaŭ tiam, se oni la planton lokas en la Faraday-kaĝo, kiu (kiel ni lernis en fiziko) ebligas trapenetri al neniuj elektromagneta radiado.

Estas ankaŭ pruvite, ke la planto, kun kiu oni parolas kaj al kiu oni direktas sian intereson, prosperas pli bone. En Findhorn (Skotlando) troviĝas malgranda agrikultura farmo, kiu al siaj plantoj (floroj, vegetaĵoj) dediĉas sian intereson same kiel al vivantaj estaĵoj. La rezulto estas nekredeblaj – koncerne la geografian (kaj geologian) situon de la lando. Ĉu plantoj bezonas „personan“ kontakton? Ĉu ili havas sian psikologion? Ĉi tie regas nemezureblaj fortoj, pri kiuj ni scias nenion...

Ĉu ekzistas ia komuna formo de komunikado al ĉiuj vivaj kreaĵoj por ni ĝis nun ne perceptebla? Ĝis nun ni ne scias, kio estas enkodigita en la baza klado (trunko) de DNA, kiu estas al ĉiuj viv-ĉeloj komuna... ni ĉiuj estas eble programitaj al la unusola komuna universa ondo...

Kompilis: Margit Turková



Oldřich Kníchal

(1939-2021)

La 21-an de marto 2021 forpasis en Pécs (Hungario) **Oldřich Kníchal**, la unua redaktoro de *Starto*, verkisto kaj tradukisto.



Li naskiĝis la 9-an de oktobro 1939 en Humenné (Slovakio), studis en Prago ĉe Karola Universitato la historion de ĉeĥaj lingvo kaj literaturo, kaj poste aktivis en Ĉeĥio kiel

ĵurnalisto. Li laboris ĉe Ĉeĥoslovaka Gazetara Kancelario, kiel faka asistanto ĉe Instituto de Historio de Eŭropaj Socialismaj Landoj de Ĉs. Akademio de Sciencoj, redaktoro de ĵurnalo *Práce* (Laboro) kun specialeco por Usono kaj Latin-Ameriko, entreprenis plurajn esplor- kaj riport-vojaĝojn al Eŭropaj kaj transmaraj landoj.

En 1979 li edziĝis al hungara esperantistino kaj verkistino Éva Tófalvy kaj ekloĝis en Hungario. Inter la jaroj 1979-1981 li estis korespondanto de pluraj ĉeĥaj kaj slovakaj ĵurnaloj en Budapeŝto kaj redaktoro de ĉeĥa kaj slovakaj versioj de gazeto Hungara Semajno. Ekde 1982 li estis redaktoro de literatura rubriko en *Ludové noviny* (Popola Gazeto), kie li recenzis slovakajn aŭtorojn kaj tradukojn el la hungara lingvo en la slovakon. Kiel lingva lektoro li kontribuis al publikaĵoj de lernolibroj, almanakoj, kalendaroj kaj gazeto SME (1988-1992).

Li verkis pri eksterlanda politiko, en gazetaro publikigis pli ol 200 beletrajn laborojn slovakajn kaj ĉeĥajn, inkluzive de tradukoj el la angla, rusa, hungara. Li ricevis plurajn literaturajn premiojn en

Slovakio kaj Hungario pro propagando de ambaŭ literaturoj. Li eldonis plurajn proprajn poemarojn, prilaboris radio-seriojn pri la slovakaj literaturo, tradukis librojn el la hungara.

Esperanton li eklernis en 1955 kiel 16-jarulo, aktivis en junularo kaj poste kunlaboris kun *Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato* (ekde 1964 kiel 25-jarulo). Li engaĝis sin ankaŭ en la MEM-sekcio kaj apartenis al redaktantoj de la ĉeĥoslovakaj numeroj de *Paco*. En 1968 li fariĝis la unua redaktoro de *Starto* (ĝis 1979), poste de *Juna Amiko* (1982-1986). Li inciatas renovigon de la movado en Kubo (1972) a kunfondis Esperantlingvan Verkistan Asocion.



Foto de Oldřich Kníchal el virtuala prelego en oktobro 2020 per komputilo de lia edzino Éva Tófalvy

El lia verkaro ni menciuj: **Co nevíte o esperantu** (1968), **Světadíl bez tlumočnicků** (1978), **Doktor se zelenou hvězdou** (manuskripto), **Komenio kaj la internacia lingvo** (1974, kun V. Novobilský), **Meze de Eŭropo** (1981, traduko kun E. Seemannová kaj A. Staňura), **Adiaŭ, Kuzko!** (1987, krimromano), **Kiuj semas plorante** (1984, romano ver-

kita komune kun la edzino E. Tófalvy), **Mediteme** (Panoramo 1980, literatura aldono de Starto – originalaj tekstoj kaj tradukoj el Majerová, Olbracht, Řezáč, Vančura). Po unu ĉapitro el Ŝvejk aperis en gazetoj Hungara Vivo (1983) kaj Fonto (n-ro 39) kaj en Nova Esperanta Krestomatia (UEA, 1991).



En la slovakaj eldonaĵoj liaj originalaj verkoj: **Predjarie** (Antaŭprintempo, 1989, rakontoj), **Kráľovstvo z iného sveta** (Reĝlando el alia mondo, mallonga romano, 1990), **Fudzi a Gorajgo** (2000, rakontado pri vojaĝoj tra Azio), **Jagavé bozky hviezd** (Trembrilaj stel-kisoj, 2002, rakontoj), **Mlyny prozreteľnosti** (Mueliloj de providenco, 2002, notoj el la jaroj 1988-1989), **Storočiami slovenskej literatúry** (Tra jarcentoj de la slovakaj literaturo, 1998), **Suterén na sever** (Kel-loĝejo fenestranta norden, 1993, ses dramoj), **Zvony dolnozemske** (Sonoriloj malsupralandaj, 1996, historia skizo pri preĝejoj sonoriloj en Slovakio). Plie li kompilis antologion de slovakaj poetoj **Od septembra do júna** (De septembro ĝis junio, 1997) kaj slovakigis hungaran poemaron de Nemes Nagy Ágnes **Ekhnáton az égben - Achnaton v nebi** (Eĥnaton en ĉielo, 1999, spegula hungara-slovaka eldono). Libro **More a čajka** (Maro kaj mevo, 1998) estas antologio de rakontoj de hungaraj aŭtoroj. Plie li tradukis lernolibrojn de historio por slovakaj gimnazioj en Hungario.

-mm-

REMEMORO JE LENKA ANGELOVÁ (1958-2021)

Lenka, fratinetto kara, kie Vi restadas? Vi ja havis tiom da planoj! Post freŝdata komenco de Via pensio Vi finfine havis sufiĉe da tempo por ĉio, kion Vi deziris fari: gvidi AEH kaj eldoni, jam sen Via panjo, bultenojn Informilo kaj Antaŭen, organizi E seminariojn ne nur en Via hejmejo kabano en Jevany, sed ankaŭ en Malá Skála kaj aliaj belaj lokoj de nia lando, organizi karavanon al ĉi-jara UK kaj ankaŭ al la venontaj, partopreni en gajaj projektoj de E-mentalo...

Kompreneble antaŭ ĉio dediĉi vin al Via familio, estadi kun Viaj karaj, mastrumi Vian belan domon kaj ĝardenon, flegi pri Via hundo...

Kien Vi foriris? Ni ne adiaŭis!


Leonarda Chaloupková



Biblioteko de F.V. Lorenz en Vrды 2018

P.S. Necesas danki al ŝia fratino Mirka Kosnarová kaj al Ludmila Srbová, kiuj daŭrigas laboron de AEH, ĉefe eldonadon de Informilo, kaj pretecon de Petro Angelov, filo de Lenka, akcepti la torĉon de siaj patrino kaj avino kaj porti ĝin plu en agado de AEH. Li mem ankaŭ suferis la saman malsanon (koronaviruson) kaj estis en la sama kriza situacio, el kiu li sukcesis saviĝi nur kvazaŭ mirakle. En Jutubo troviĝas nepublika rememora video [Kanto pri Lenka](#) - adapto de ŝia ŝatata kanto "Longulo Frankie" en traduko de V. Türk kaj interpreto de P. Dvořáková.

Kondolencoj



■ La 18-an de marto 2021 forpasis en Benešov **Marie Žížalová**, aktiva ankaŭ en AEH kaj IKUE.

■ 19.3.2021 forpasis en Tábor **MVDr. František RYTÍŘ**. Li naskiĝis 12.9.1929 en Čekanice, profesie li laboris kiel bestkuracisto kaj sekve kiel inspektoro pri kvalito de lakto kaj pri abelmalsanoj. Pri tiu problemaro li estas ĝenerale rekonata fakulo. Li esperantiĝis en 1973 kaj pere de korespondado, vojaĝado kaj gastigado havis viglajn kontaktojn tutmonde. Li estis aktiva membro de la Katolika sekcio de ĈEA, longdaŭra prezidanto de la E-klubo en Tábor kaj kunorganizanto de gravaj aranĝoj tie okazintaj (i.a. ĈEA-Kongreso en 1999 kaj IFEF-Kongreso en 2001). Li estis aprezita inter la plej longdaŭraj (seninter-rompaj) individuaj membroj de UEA. Valoraĵoj de lia riĉa biblioteko estis dediĉitaj el E-muzeo en Svitavy. Krome li agis kiel kronikisto de la paroĥejo en Klokoty kaj membro de ties konsilantaro. Li multe meritis pri karitata agado por eksterlandaj misioj - inter 1999 kaj 2020 li kolektis, analizis kaj forsendis ĉ. 300 kg da poŝtmarkoj. Kun sia edzino li edukis kvar gefilojn. Ĝis sia alta aĝo li konservis vere admirindan fizikan kaj mensan freŝecon. En niaj rememoroj li restos kiel viro de multaj metioj kaj de granda ĉiam helpopreta koro. -



padv-



Samtage 19.3.2021 forpasis en Písek en sia familia medio **Zdenka FOLKOVÁ** (nask. 14.10.1927). Laŭprofesie bibliotekistino kaj arkivistino, laborinta en Tábor, Písek kaj Prago. Ŝi esperantiĝis en la 1960-aj jaroj en Tábor, ekde fino de la 1980-aj jaroj unu el la kernaj membrinoj de la E-klubo La Ponto en Písek kaj ĝia ĉieesta societema kaj gastama animo. Ĉiam eleganta kaj agrabla klera virino kun riĉaj kulturaj, politikaj kaj spiritaĵaj interesoj kaj engaĝiĝoj, ĝis siaj lastaj tagoj ŝi ne perdis intereson pri la mondo. Ŝi restos por ni modelo de tio, kiel beleco, eliranta el interno, kaj sano kaj psika vigleco vere povas konservita ĝis la alta aĝo.

-padv-

Ni rememoras forpason de niaj honoraj membroj

- Lada Bala (antaŭ 15 jaroj)
- Rudolf Horský (antaŭ 20 jaroj)
- Ludvík Chytil (antaŭ 10 jaroj)
- Ludmila Klegová (antaŭ 10 jaroj)
- Miloš Lukáš (antaŭ 45 jaroj)
- Václav Špůr (antaŭ 25 jaroj)

Nova libro: El Mirinda Mondo de Dipteroj (*Insecta, Diptera*)

Oldřich Arnošt Fischer



Oldřich Arnošt Fischer

EL MIRINDA MONDO DE DIPTEROJ (*Insecta, Diptera*)

La ordo Diptera (Dipteroj) apartenas al la plej multenombraj insektaj ordoj. En Ĉeĥa Respubliko troviĝas pli ol ok miloj kaj en tuta la mondo eĉ 122 miloj da konataj specioj. La libro *El Mirinda Mondo de Dipteroj (Insecta, Diptera)*, kiu havas nur 79 paĝojn, estas nek atlaso nek lernolibro de entomologio. Ĝi informas pri specioj de Ĉeĥa Respubliko kaj atentigas pri iliaj signifoj. Koloraj fotoj estas koncize komentataj. Malofte uzataj fakaj esprimoj estas klarigitaj.

Jam en antikva epoko kelkaj grupoj de dipteroj apartenis al konataj molestantoj de homoj kaj paŝtiĝantaj bestoj (Eliro 8, 12-27), sed sciencistoj malkovris signifon de dipteroj, kiuj kapablas trans-

misii kaŭzantojn de infektaj kaj parazitaj malsanoj. Kelkaj specioj de dipteroj damaĝas plantojn kaj stokitajn nutraĵojn kaj furaĝon. Larvoj de granda amaso da dipteroj evoluas en mortaj korpoj de plantoj kaj bestoj kaj fekaĵoj reduktante biomason kaj helpante al cirkulado de materio en la naturo. La dipteroj estas nutraĵo de multaj bestaj specioj. Parazitismo estas ofta strategio – en la libro estas menciitaj la specioj, kiuj parazitigas en nestoj de sovaĝaj abeloj kaj krabroj. Sed inter la dipteroj estas ankaŭ superparazitaj: la parazitaj dipteroj de aliaj parazitaj dipteroj. La dipteroj, kiuj vizitas florojn, estas signifaj polenantoj. Larvoj de sirfedoj voras folilaŭsojn (afidojn), eĉ kaŝe vivantajn subterajn folilaŭsojn, kiuj suĉas sur radikoj de plantoj.

Scio de dipteroj estas necesa por pli bona kompreno de vivanta naturo.

Baldaŭ la libro estos mendebla en interreta librovendejo de Esperantista Klubo Brno (butiko@esperantobrna.cz, <https://butiko.esperantobrna.cz>).



**La libro aperas omaĝe
al 120-a datreveno
de Esperantista klubo en Brno**

JUBILEANTOJ DE APRILO, MAJO KAJ JUNIO

Petr Brzoska, Havířov – Horní Suchá
Dr. Pavla Dvořáková, Písek
Stanislav Franc, Pardubice
Jiří Hanousek, Liberec
Jan Holčápek, Králupy
Eva Husáková, Praha
Ing. Vlastimil Kočvara, Opava
Anna Kubíková, Hranice
Jaroslav Liška, Prostějov
Ing. Irena Papírníková, České Budějovice
Ing. Zdeněk Pluhař, Praha
Milada Polláková, Rohovládova Bělá
Ing. Jiří Pospíšil, Hostice
Zdenka Rejlová, Třebíč
Jarmila Šolleová, Žandov u České Lípy
Ing. Břetislav Švidrnoch CSc., Hranice

Al ĉiuj jubileantoj ni sincere deziras antaŭ ĉio sanon, ankaŭ bonfarton kaj bonhumoron!

Vlastimil Kočvara – 85



Honora membro de ĈEA kaj iama asocia prezidanto [Vlastimil Kočvara](#) atingis la 12-an de aprilo 2021 sian 85-jariĝon.

Li estas honora membro ankaŭ de Ĉeĥa Numismatika Societo, kiu honoris lian jubileon per speciala medalo (aŭtoris Jiří Hromada), sur kiu ne mankas ankaŭ simboloj de Esperanto kaj de Silezio (li membras ankaŭ en sileziaj historiaj kaj kulturaj institucioj).



En la ĈEA-estraro li laboris ekde 1969, unue kiel komitatano, poste vicprezidanto kaj prezidanto. Dum lia prezidanteco realiĝis UK 1996 en Prago. Li zorgis pri eldona agado de ĈEA, preparis ekz. eldonadon de la serio *Panorama* (kun O. Kníchal), de *Sileziaj kantoj* (Bezruč), *Majo* (Mácha), *Ĉiam malnova kaj ĉiam nova* (Bradatsch) k.a. Li kontribuis ankaŭ al ĉeĥlingvaj publikaĵoj, foje kun fakaj, foje kun esperantistaj temoj (ekz. pri Regiona Esperantista Ligo). Al studentino Eliška Votýpková li helpis prilabori diplomlaborojn pri Esperanto en Ĉeĥoslovakio inter 1945-1975 kaj speciale en Opava. Nur listo de liaj artikoloj bezonus 15 paĝojn.

Zdeněk Pluhař – 85



Honora membro de ĈEA [Zdeněk Pluhař](#) atingas la sama jubileon la 2-an de majo 2021. Kiel ĥemiisto li verkis *Esperantan-ĉeĥan kaj ĉeĥan-esperantan vortaron* kaj multajn artikolojn pri ĥemio, ekz. en la periodaĵoj *Kemio Internacia* kaj *Sano*, en la kajeroj KAEST (plurajn li mem redaktis). Sed li aŭtoris ankaŭ vortaretojn: ekoturisma, agrokemia, farmacia, imunokemia, kurac-herba, de ĥemia nomenklaturado kaj ĥemia metrologio. Plie li estas la plej grava kontribuanto al la vortaroj de Kraft kaj Malovec. Kun Josef Černý li esperantigis scienfikcian romanon de Ivan Efremov *La nebulozo de Andromeda*.

Dum multaj jaroj li laboris en la estraro de iama scienc-teknika sekcio de ĈEA, kiel profesia sekretario de ĈEA inkluzive gvidadon de libroservo, poste en la firmao KAVA-PECH.

Vladimir Samodaj

(1935-2021)


Fama rusa esperantisto, honora membro de UEA, Vladimir Vladimirovič Samodaj, forpasis la 31-an de marto 2021 en Odeso (preskaŭ 86-jara). Li estis filologo-arabisto kaj laboris kiel tradukanto el tiu lingvo en la rusan. Esperantisto ekde 1958, aktivulo de sovetia esperantista junularo, redaktoro de sovetiaj numeroj de *Paco*, de politikaj *Moskvaj novaĵoj* (12 esperantlingvaj numeroj) kaj de moskva literatura gazeto *Cerbe kaj kore* (50 numeroj), de internacia revuo *Scienco kaj kulturo*, kaj eldonis poemaron *Konfeso*.



Andrzej Pettyn


(1938-2021)

La 23-an de aprilo 2021 forpasis honora membro de UEA kaj akademiano Andrzej Pettyn (83-jara). Li estas konata precipe kiel redaktoro kaj parolisto de Pola Radio dum kvardek jaroj kaj ankaŭ kiel aŭtoro de multaj lernolibroj inkluzive de gramofondiska kurso *Ĉu vi parolas Esperante?* Li ankaŭ verkis esperantan-polan kaj polan-esperantan vortaron, eldonigis kazedon kun la voĉo de Zamenhof, skizis Esperanto-movadon en Pollando k.a.



Ovofritaĵo

Ankaŭ nunjare nia Esperanto-familio tradicie kunvenis por ovofritado en belega submontara regiono de Beskidoj. Pro sufiĉe forta vento estis ovofritaĵo preparita en kuirejo kaj estis tre bongusta.



Retaj programoj de E-Klubo Brno aŭskultebblas en Jutubo

Kun admirinda persistemo kaj oferemo E-Klubo en Brno daŭrigas sian tradicion de ĉiusemajnaj diverstemaj prelegoj - nuntempe virtualaj kaj do alireblaj por vi ĉiuj. Ĉiutage ekde la 18-a horo vi povas konektiĝi senpage pere de la programo Skype aŭ sekve spekti la registraĵon en la kluba videokanalo ĉe [Youtube](#). La klubon vizitas ankaŭ eksterlandaj gastoj, do ne maltrafu la okazon kunesti!

16.3. [Ludo Kodaj nomoj rete](#) (M. Kolka)



23.3. [Radiojournal Brno, esperanta amuza vespero](#) (L. Chaloupková)

30.3. [Kion ni legas](#) (komuna diskuto)



6.4. [Sovaĝaj bestoj en industria urbo Brno](#) (O. Fischer)

13.4. [Stanislav Schulhof kiel progresema judo](#) (P. Chrdle)



20.4. [Kion pandemio alportis al ni](#) (komuna diskuto)

27.4. [Theodor Kilian](#)

(L. Chaloupková kaj M. Malovec)

4.5. [Humuro por pli bona humoro](#) (J. Vojáček)

11.5. [Rakontoj laŭ kubo, Kodaj nomoj](#) (M. Kolka)

18.5. [Esperanta literaturo](#) (ĉeĥlingve - M. Malovec)



25.5. [Arbarista panteono](#)

(M. Hruška)

1.6. [Bertha von Suttner](#), la unua ina nobelpremiito pri paco (P. Chrdle)

Informojn pri aktualaj aranĝoj vi povas sekvi en la Kalendaro de aranĝoj en [Esperanto.cz](#), en la paĝo Esperanto Brno ĉe [Facebook](#), en [Eventaservo.org](#) aŭ laŭpete al brno@esperanto.cz vi povas ricevi ĉiusemajne freŝan anoncon al via retpoŝto. Bonvenu! *-padv-*

MLADÁ BOLESLAV AGAS

Dum nia klubo ne povis kunveni, ni vigle aranĝis "retan kurson" por ekzerci la lingvon. La taskoj estis mallongaj. Jen du ekzemploj por tiuj, kiuj volas partopreni kun ni plu:


Traduku kaj solvu la malnovan enigmon:

Kiu tion fabrikas, ne volas tion havi.

Kiu tion aĉetas, tute ne bezonas tion.

Kiu tion bezonas, ne aĉetas tion.

Unu blinda almozulo tenis en siaj manoj tabulon: "Mi estas blindulo, kiu petas monon". Unu verkisto, kiu tiu-momente preterpasis, haltis kaj reskribis la tabulon. La teksto, kiun li skribis: "Mi tre bedaŭras ke mi ne povas ekvidi la printempon". La homoj pli volonte donis monon. Jen estas la magio de la vorto, kiun oni bele diris.



En majo estis eldonita nova libro "**ANDREO CSEH - život a dílo**" de **Ed Borsboom** en ĉeĥa traduko (200 paĝoj, prezo 150 Kč).

LEGAĴOJ VIII. kaj VII. kun facilaj artikoloj kun diversaj temoj, estas akireblaj kontraŭ 50 Kč.



Skribu al drahotova@esperanto.cz

Por informi publikon de la regiono Mladá Boleslav ni aliĝis al la alvoko de kulturamazelenou.cz, aranĝita de la loka firmao Škoda, kaj provis serĉi spurojn de Esperanta movado en nia regiono. Niaj trovoj aperos sekvontnumere.

"*Historio de Esperanta movado en la regiono Mladá Boleslav*" estas provo dum du monatoj priskribi agadon de esperantistoj en dudeka jarcento en nia regiono. La laboron malfaciligis pandemio kaj fermo de muzeoj, arkivoj kaj bibliotekoj, eĉ malvolonto de ties laboristoj. Valorajn materialojn ni tamen akiris en Mnichovo Hradiště kaj Dolní Bousov kaj esperanto.cz.

Okdekpagan materialon preparis Jindřiška Drahotová, Miroslav Vaněk kaj Blanka Hužerová, kompreneble en ĉeĥa lingvo.

Jindřiška Drahotová

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální adresa@esperanto.cz

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. 723 672 335. Předplatné uhradte na účet u **Equabank**, č. ú. **101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto: reta almanako 420,-Kč

Časopisy a knihy na internetu

Časopisy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitgazetoj.html>


Knihy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html>

Internetový kurz esperanta, třeba pro ty, kteří si chtějí oprášit své znalosti

<https://lernu.net/cs>

Pohádky z celého světa přeložené z esperanta Jindřiškou Drahotovou a namluvené dětmi z literárně-dramatického oboru Základní umělecké školy Bohuslava Martiniů v Havířově.



Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
52. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2021

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 52-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2021

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO 2021

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

(Ĝis nuligo) ĉiumarde virtualaj kunvenoj de E-
Klubo en Brno - gastoj bonvenas!

info: brno@esperanto.cz

2021-06-20 Ĉantoryje

info: suchanekj@seznam.cz

2021-07-26 Surspure de doktoro Zamenhof en
Varsovio - la 2-a parto de la reta prelego de
Pavla Dvořáková

en la [platformo de la E-Klubo en Prago](#)

- ekde 18.30

2021-08-13/15 Renkontiĝo de ekstendaranoj en
Lančov

info: let.lancov@seznam.cz

2021-09-04 Renkontiĝo en la Esperanto-Muzeo
en Svitavy

info: dvor.libuse@seznam.cz

2021-09-18 Festo omaĝe al 120jariĝo de la
Esperantista Klubo en Brno

info: brno@esperanto.cz

2021-10-01/03 ĈEA-konferenco en Bartoŝo-
vice

info: komitato@esperanto.cz

Eksterlandaj aranĝoj

2021-07-14/21 La 2-a Virtuala Kongreso de
Esperanto (anstataŭ nuligita
La 106-a UKo)

info: <https://vk.esperanto.net/>

2021-07-25/-08-01 La 94-SAT-Kongreso en
Bjalistoko laŭ cirkonstancoj hibride aŭ virtuale

info: <https://sat.bialystok.pl>



2021-07-30/08-08 La 77-a TEJO-Kongreso
nur virtuale - info: <https://ijk2021.tejo.org>

2021-08-20/27 La 88-a Itala Esperanto-
Kongreso en Asizo

info: <https://kongreso.esperanto.it>



La 50-a lingva seminario en Malá Skála
17-20 septembro 2020 aranĝita de Lenka
Angelová



"Surspure de doktoro Zamenhof en Varsovio"
reta prelego de Pavla Dvořáková 15.4.2021
E-Klubo en Prago ĉe la platformo Jitsi




Partoprenantoj de la seminario en Malá Skála



"Bertha von Suttner, la unua Nobelpremiitino
pri paco" - reta prelego de Petro Chrdle
1.6.2021 - kadre de E-Klubo Brno ĉe Skype



Simbola adiaŭo kun Lenka Angelová ĉe la
E-monumento en Prago-Vyšehrad 29.3.2021



Unu el regulaj retaj E-mentalaj kunvenoj
ĉi-foje pri la temo "ĈAPOJ KAJ ĈAPELOJ"
18.3.2021